DIA REGNO ISSN 0167-9554


# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 3 (888) • 2011 •

Nia frato

## Jacques Tuinder

mortis la 18-an de junio 2011



*Se vi estas la nura persono en la mondo*
*portante kandelon en la mano,*
*tiam estos lumo en la mondon!*

**KELI**
**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe COUSSON
🖂 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021;
💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
🖂 Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
✆ +420 325 615 651; 💻 cea.polnicky@quick.cz

**Kasisto**: Siegfried KRÜGER
🖂 Claudiusweg 10,
DE 74074 Heilbronn, Germanio
✆ +49 7131 162688;
💻 siegfriedkrueger@arcor.de

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

**DIA REGNO**

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
🖂 Västergårdsg 15; 256 64 Helsingborg; Svedio;
✆ +46 (70) 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec

## ENHAVO

| | |
|---|---|
| Vizaĝoj de KELI | 51 |
| Kristanoj kaj Paganoj | 55 |
| Senkuloulo preferas vivon enkarcerigitan | 56 |
| Germana Evangelia Foiro | 58 |
| Kelkaj ideoj de S Kierkegaard | 60 |
| Sekretaria jarraporto 2010 | 63 |
| Propono pri statutŝanĝo | 64 |
| Plej gravaj kongresaj programeroj | 65 |
| Propono pri tagordo | 65 |
| Financaj raportoj | 66 |
| Informetoj | 70 |
| La tero granda tablo estas | 72 |

## REDAKTORAJ VORTOJ

Vere estas malgaje skribi tiujn ĉi vortojn, ĉar la mesaĝo ke nia frato kaj bona amiko Jacques Tuinder mortis, surprizigis kaj ŝokis min kaj aliaj. Certe la plejmultaj el vi jam aŭdis pri lia forpaso. Mi renkontis lin kaj lian familion 1977 dum la kongreso en Edinburgo kaj survoje hejmen mi vizitis ilin en ilia hejmo. Ĉiam estis granda ĝojo renkonti lin kaj lian edzinon Vera dum kongresoj.

Kiam vi legos la lastan parton pri Kierkegaard ĉi-numere, mi ŝatus aldoni lian nomon inter la aliaj nomoj je la fino de la artikolo. Laŭ mi la amo de Dio vere trafluis Jacques kaj ĉiuj kiuj renkontis lin, ricevis de tiu amo. La beno de Dio restu ĉe la familianoj.



Lastminute ni ricevis la malgajigan informon ke nia kara frato **Jacques Tuinder** subite mortis la 18-an de junio.



Jacques estis dumviva lumiganto, dumviva membro de KELI kaj IKUE, longjara estrarano de KELI, prezidinto de IKUE (1966 – 1971) kaj KELI (2000 – 2004).

Lia kandelo estis la batalo kontraŭ nenecesa blindeco *“en la spirito de lingvisto-okulisto Zamenhof kaj instruisto-kuracisto Jesuo”* (liaj vortoj)!

Kore kondolencas la familianojn
*Siegfried Krüger*

(Nekrologon vi trovos en sekvonta numero)

# Vizaĝoj de KELI

Philippe Cousson, FR

Dum tiuj kelkaj linioj, mi invitas vin al promeno tra la historio de nia Ligo, sed ne kiel tradicie en la sinsekvo de la jaroj kaj eventoj, sed per portretoj de kelkaj el tiuj, kiuj vivigis la aferon ĝis nun.

Kompreneble mi ne longe parolos pri ĉiu, nur kelkajn impresojn kaj bildojn mi lasos al vi. El ili mi persone renkontis kelkajn, perletere kontaktis plurajn aliajn, legis kaj aŭdis pri la aliaj.

Por la unua periodo de nia komuna vivo, ni havas trezoron, la libron Nia Historio kiu priskribas la 50 unuajn jarojn de KELI. Oni povas tiel konstati ke similaj diskutoj kaj disputoj okazis ekde la komenco kaj daŭras ĝis nun, kiam ni volas senrustigi la statuton.

Tamen mi ne volas nun paroli pri teoriaĵoj, sed pri personoj. Sen personoj por sperti kaj porti la Ligon, tiu simple ne ekzistus.

Mi anticipe petas pardonon de la estontaj historiistoj kiuj legos ĉi tiun tekston, ĉar mi ne indikos precizajn datojn kaj referencojn. Iu devus fari tiun ĉi laboron por la dua duonjarcento de nia ligo.

Kiel ordigi tiujn pecojn, mi multe hezitis. Ĉu per periodo? Aŭ laŭ landoj? Aŭ hazarde? Mi komencos per la prezidantoj, kaj poste mi prezentos aliajn same gravajn personojn.

Ĉefa honoro al la fondinto, malgraŭ ke li ne estis sola en Antverpeno por tio, Paul Hübner, Germano. Li komencis per revuo kiun li lanĉis por ke Esperanto estu uzata en KAJV (t.e. YMCA), poste ankaŭ ene de Kristana Celado (Christian Endeavour), kaj ankaŭ por ĉiuj veraj kristanoj. Post lanĉo de la revuo, klopodado por akceptigo de Esperanto ĉe KAJV, li fariĝis la unua prezidanto de tio, kio fariĝis poste KELI. Same kiel la alia germana prezidanto, li estis dufoje prezidanto. Fakte la intertempa prezidanto, la anglo H. A. Luyken grave malsaniĝis. Lin pelis la politikaj cirkonstancoj el Germanio antaŭ la dua mondmilito. Ĝis sia morto, Hübner restis LA figuro de la pioniro kaj fondinto. Lin oni ankoraŭ vidas sur foto de la 50-jara jubileo aperinta en Nia Historio.

Dum la milito prezidis la svedo Ivar Karlsson. Kun aliaj li partoprenis en la jaroj 1930 al la starigo de sveda sekcio de KELI. Tiu disvolviĝo de KELI ŝuldas ankaŭ al la kursoj de Cseh kaj Morariu en Svedio. El tiu fonto venis ankaŭ pluraj aliaj gravaj svedaj KELI-anoj.

Post la milito fariĝis prezidanto Erik Carlén, alia svedo, pentekostano kaj entreprenisto. Lia prezidanteco komenciĝis en la jaro de grava evento por KELI, la unua kongreso, Tostarp, 1948. Tiu poste ne estis komplete entuziasma pri la ekumena strebo kiu komencis efektiviĝi en 1968. Li estis dum certa tempo ankaŭ vic-prezidanto de UEA. Lia ideo, kiun dividis ankaŭ aliaj, precipe svedoj, estis misiado pere de Esperanto, eĉ sendado de esperantista

---

## Erik Carlén kreis ”semajnon de internacia amikeco”

Semajno de Internacia Amikeco volas esprimi la ”internan ideon” de Esperanto per aliaj vortoj: Amikeco trans limoj – limoj naciaj, rasaj, lingvaj, kulturaj, politikaj kaj religiaj. Sed ni ne nur bele vortumas la ideon, ni ankaŭ volas konkretigi ĝin per agoj ĉe esperantistoj kaj ĉe aliaj.




La Semajno ankaŭ celas krei fortan, belan tradicion inter la esperantistoj kaj samtempe fari Esperanton konata al vasta publiko en tute nova maniero, kiun oni antaŭe ne uzis en la priesperanta infarmado. La Semajno okazos la unuan fojon en februaro 1969, 16-an - 22-an.

misiisto ien ajn en la mondon. La sendado de misiisto ne efektiviĝis, sed misio pere de Esperanto vivis.

Tiu Esperanto-Misio estis la frukto de la laboro de du aliaj svedoj, paro kiu gefianĉiĝis en Tostarp, kaj longe agadis, Karl Olof Sandgren kaj Anna Sandgren (antaŭe Hendriksson, Alamo). Mi korespondis kun li sed renkontis nur ŝin. Ili estis organizitaj kiel bona efika taĉmento, li – la organizado, ŝi – la parolado. Dank' al tio, dum multaj jaroj la KELI-movado estis forta kaj forte subtenata en Svedio. Li zorgis pri korespondaj kursoj kristanaj, ankaŭ tiujn de la Navigantoj (The Navigators), tradukitaj kaj adaptitaj al Esperanto. Li eldonis kaj disdonis la serion de broŝuroj Greneroj por la animo. Li ankaŭ kompilis religiajn referencojn, kies rezulto estas la libro finpretigita de Leif Nordenstorm: Religia literaturo en Esperanto.

La fino de tiu unua duonjarcento de KELI daŭris sub la prezidado de Nederlandano, Henk de Hoog, instruisto. Li estas tiu, kiu verkis tiun ofte cititan verkon, Nia Historio. Li estis ankaŭ membro de la Akademio de Esperanto. Li verkis gravan libron pri la fama disputo ata-ita. Li estis ankaŭ unu el la kompilintoj de la himnolibro Adoru kantante, kune kun lia posteulo.


Ernst Leuze

Prezidanto de KELI fariĝis en 1961 juna (tiam) germana pastoro Adolf Burkhardt, kies graveco en nia ligo similas al tiu de Hübner. Kiel tiu ĉi, li estis prezidanto dufoje, kun intervala prezidado Reg Bedford, angla arkitekto. Pli ol 40 jaroj da agado kompreneble influis la vivon de la Ligo. Mi povos nur mencii kelkajn: Adoru Kantante, gvidado de la kongresa ĥoro, ekesto de la ekumenaj kongresoj, agado al Orienta Eŭropo kaj kongresoj tie eĉ en malfacilaj kondiĉoj, post longa kunalborado kun germana katolika pastro, kiun mi poste mencios, apero de la himno- kaj preĝ-libro Adoru. Apud la agado en KELI, li ankaŭ zorgis dum multaj jaroj pri la biblioteko de la Germana Esperanto Instituto, kiu okupis plene ĉambron en lia (ĝenerale granda) pastra domo.

Post li dum kelkaj jaroj prezidis la Nerderlandano Jacques Tuinder. Tiu estis ‘en alia vivo’ prezidanto de la katolika IKUE, kaj partoprenis en la organizado de la unua ekumena kongreso esperantista. Profesie, li estis sociala helpanto. Inter esperantistoj, li estas ĉefe konata pro lia helpoprojekto al la nenecesaj blinduloj E3, nun Evidente. Mi memoras ke en kongresoj li vendis pupojn kaj aliajn donacojn kiujn sendis al li homoj el landoj el kie oni ne povis transpagi monon. Li ankaŭ kolektis okulvitrojn. Li kapablas skribi

kaj legi brajlon, kaj ankaŭ flue la malnovan grekan. Li ankaŭ aktivas en la movado de la bazkomunumoj. Dum multaj jaroj li ankaŭ voluntule servis en abatejo kiel kandelfaristo. Kelkaj el liaj tradukoj troviĝas ankaŭ en Adoru.

Por Adoru multege laboris ankaŭ du katolikaj pastroj, gravaj homoj ankaŭ en la historio de KELI. Ili estas Albrecht Kronenberger kaj Bernhard Eichkorn. Tiu lasta havis dum multaj jaroj komplicecon kun Adolf Burkhardt. Ili renkontiĝis, preĝis kune, organizis, kaj laboris. Ekzemplo de tiu kunlaboro estis ankoraŭ la germanlingva Ökumenische Esperanto-Forum, informbulteno pri Esperanto en religiaj agado kaj medio.

Ernst Leuze, germana protestanta muzikdirektoro, ankaŭ helpis en Adoru, zorgante pri la muzikaj aranĝoj. Krom tio, li estis en multaj niaj kongresoj la oficiala orgenisto, akompanisto kaj koncertisto.

Antaŭ tiu Adoru funkciis la jam menciita Adoru Kantante. Apud de Hoog kaj Burkhardt kunlaboris ankaŭ la svedo Åke Ahlrén, granda amiko de Ĉeĥio, la norvega pastoro Hans Amund Rosbach, frato de Johan Hammond, kaj la angla profesoro kaj pastoro W. J. Downes. Ties himnon ni ofte kantas dum kongresoj inter aliaj lia: *Venu kredantoj, kantu al Dio*. Antaŭ ol partopreni en KELI, li agadis en grupo nomata la bar-rompantoj.

Inter la anglaj muzikistoj esperantistoj, mi devas nepre mencii Montagu Christie Butler. Lia nomo troviĝas plurfoje en Adoru kantante kaj Adoru, ĉar li tradukis multajn anglajn himnojn, kaj estas ĉe la origino de Himnaro esperanta. Tiu ĉi kolekto estis uzata en la Esperantaj Diservoj en Londono kaj aliaj lokoj kiuj komenciĝis sufiĉe frue, antaŭ la unua mondmilito.

Aliaj anglaj (britaj) membroj aŭ ne-membroj nepre menciindaj estas tiuj, kiuj permesis la eldonon de la tuta Biblio (komence nur 'protestanta'), la pastoro John Cyprian Rust, tradukisto kaj kontrolisto, kaj la fratinoj Peckover, kvakerinoj, kiuj dediĉis grandan sumon

---



Paul Hübner, 87-jara fondinto de KELI, eldoninto kaj redaktoro de Dia Regno dum multaj jaroj: Kio estas via opinio pri la unua ekumena kongreso? "Mi estas tre kontenta pri la kongreso. Tuj post la fondo de KELI mi sopiris al tia okazaĵo. Ĝi estas granda progreso. Mi esperas, ke oni daŭrigos". Kion vi malŝatis? Kio plej trafis vin? "La amika diskuto en mondo, en kiu estas tiom da kontraŭaĵoj".

intervjuo fare de la redaktoro de Dia Regno 1968, ĉerpita el Espero katolika 9/1968)

al tiu eldono. La ne-ekzisto de la Biblio en Esperanto estis unu el la respondoj kiujn ricevis Hübner el KAJV por ne akcepti fine Esperanton. Ĝi aperis nur preskaŭ 20 jarojn poste. Kompreneble, ni ne devas forgesi ke la traduko de la Malnova Testamento estas de Zamenhof mem, krom kelkaj korektoj.

Fine de la 20a jarcento, aldoniĝis al tiu teksto la tradukoj de la Nederlandano kaj akademiano (unu plia) Gerrit Berveling de la Duakanonaj libroj, t.e. la grekaj libroj de la katolika Malnova Testamento. Gerrit estas remonstranta pastoro kaj instruisto pri la klasikaj lingvoj. Li estas verkisto, tradukisto, poeto kaj li predikis dum KELI-kongresoj kaj UK. Por la lasta eldono de la Biblio, necesas mencii ankaŭ la du jam cititajn Bernhardt Eichkorn kaj Albrecht Kronenberger, kaj ankaŭ Petr Chrdle, ĉeĥa eldonisto kaj ano de la Husana Eklezio.

El tiu sama eklezio tipe ĉeĥa apartenis ankaŭ alia grava persono en la vivo de KELI dum la malfacilaj jaroj de la lando. Tiu estis Rudolf Horský. Mi memoras pri la oftaj fotoj de lia



Éva Farkas

praga grupo en Dia Regno, kun muzikinstrumentoj. Li estis profesoro kaj dekano en la Hus-fakultato.

Alia vizaĝo kiu restas el tiu periodo loĝas en Budapeŝto. Éva Farkas, edzino de pastoro, instruis Esperanton al multaj generacioj de Hungaroj, gvidis Biblian studgrupon, organizis kongresojn, parolis en radio. Ŝi aperas iel kiel la avino de la hungara KELI.

Alia avino de nia movado ofte predikis kvankam nur 'laika' pastorino. Jelly Koopmans estas la nederlanda aŭtorino de la preĝlibreto *Preĝo por ĉiu tago*. Tiuj, kiuj konis ŝin ne povas forgesi la impreson kiun lasis tiu ĉi kvieta virino.

Mia teksto fariĝas pli longa ol mi antaŭvidis, kaj mi certe forgesos iun. Mi anticipe petas pardonon. Ne ofendiĝu se tiu aŭ tiu alia ne estas menciata. Mi intencis paroli pri aliaj, eble poste. Sur mia listo restas David Featherstone, Mervyn Jackson kaj Shorty, Joël Thézard, André Bachelier kaj Henri Dabezies, la Madagaskarano Rakotondravao, la Nederlandanoj Tini Putto kaj Jan van Keulen, ktp ktp. por ne paroli pri la nun delonge ankoraŭ aktivaj.

Ankaŭ vi povas rakonti pri viaj spertoj kaj renkontoj pere de KELI. Certe Bengt Olof, nia redaktoro, akceptos viajn kontribuojn.

Ni ne povas ne danki Dion pro tiuj homoj, kiuj permesis tiun spiritan riĉecon alveni sur nin. Jubileu!

# Senkulpulo preferas vivon enkarcerigitan.

Jacques TUINDER, NL

Tiuj kiuj sekvas la baldaŭ jam 45-jaran agadon de Fonduso 'Evidente' scias,ke ĝia iniciatinto kaj ĝisnuna prezidanto plurfoje laboris kun okulistoj kaj optikistoj en prizonoj. La ĉefa tasko estas mezuri okulojn kaj havigi, se necese, laŭreceptajn okulvitrojn. Libervoluloj klopodas dum siaj misioj helpi al homoj plej malriĉaj en landoj kun tiel nomata malforta ekonomio. Antaŭ kelke da jaroj mi kiel donacon kaj dankesprimiĝon ricevis de enprizona artisto krucifikson kun belstile eltranĉita Jesuo-korpo. Sub Liaj tranajlitaj piedoj troviĝas libro malfermita kun la pensiga teksto: *"Per kia mezuro vi mezuros, per tia oni mezuros al vi*" (Mat.7,2). La Biblio nin alvokas 'ne juĝi'. Nu, ni ne vizitas tiujn infernojn por juĝi, sed por servi!

Eble vi iam aŭdis pri la belga, siamaniere praktikanta pastoral-teologo Johano De Cock. En la jaro 1987 li por la unua fojo volontule ekdeĵoris en Latin-Amerikaj kvartalaĉoj. Tie li kontaktiĝis kun surstrate vivantaj infanoj, kiuj ne malofte enprizoniĝis. En Ĉilio tiu 'special-edukisto' decidis transloĝiĝi de la strato al la malliberejo. Ekde 2000 Johano advokate pledas por pli bonaj vivokondiĉoj en punejoj. Tiel li noble servis en landoj kiel Haitio, Meksiko kaj Madagaskaro. Li igis sin libervole enkarceriĝi en unu el la plej mizeraj kaj plorigaj prizonoj de Kongolando. Li streĉis siajn fortojn realigi kun aliaj pli homindajn cirkonstancojn por la malliberuloj. Nune li faras la samon en porjunulara malliberejo en Bolivio. Lia vokiĝo estas serĉi homojn, kiuj vivas sen celo kaj destino, sen hejmo kaj parencoj, sen perspektivo kaj espero. Kvin verboj karakterizas lian vivon: aŭskulti kaj kompreni, kompati, pardoni kaj repaciĝi.

Dum la plej multaj prizonuloj ŝatas plej rapide liberiĝi, la 46-jara Bruselano Johano De Cock tamen faras ĉion eblan por povi enŝteliĝi. Li ne estas krimulo, sed preferas fariĝi senkulpa karcerulo. Jam 15 jarojn li vojaĝas tra la mondo por vivi inter malliberuloj en landoj kiel Ĉilio, Kongo, la Rusa Federacio kaj Guatemalo. De tempo al tempo lokaj aŭtoritatuloj donas plenan sian kunlaboron aŭ eĉ invite petas liajn servojn, sed kelkfoje li devas ion ruzan pripensi por enirpermeso. En Ĉinio, sur la ĉefurba placo, li ekzemple disdonis – kia krimo! – rozajn florojn al soldatoj. Kaj en Laoso li ekpromenis sur apudprizona tereno, kio estas faro tie absolute nepardonebla. Pri siaj vojaĝoj kaj spertoj li verkas legindajn librojn kaj amaskomunikile informas vastan publikon.

Kiam Johano en la komenco de sia 'kvazaŭkrimula' kariero subtrudiĝis en afrikan prizonon, li aŭdis ke ĝi estas konstruita por nur dumil homoj, sed

fakte enestis sepmil...

*”Ni tie vivis kiel rafanetoj en fasko. Gardistoj faris sian laboron ekstere kaj neniel zorgis pri ĉio okazanta interne. Tia malliberejo similas etsocion. Malliberuloj interŝanĝas servojn: unu faras muzikilon, alia riparas ŝuojn aŭ vestaĵojn. Instruisto donas lecionojn pri angla lingvo aŭ geografio. Laŭ la prizonestro ĉirkaŭ 4000 el 7000 estis senkulpuloj.”* Kiel Johano mem!

La koro kaj kapo de Johano estas plenaj de kortuŝaj rememoroj.

“*Iam mi troviĝis en Brazila prizono. Unu el miaj kunĉelanoj eniris sian sepan punjaron pro mortigo de taksiisto. Dum la lasta tempo ĉiusemajne vizitis lin parencoj de la ŝoforo. Kial do? Nu, la vidvino havis vivdanĝeran renmalsanon, kaj la nura solvo estis transplantado de reno. Spontane pretis la koncerna prizonulo. Li fordonacis renon al la virino, kies edzon li antaŭ longe de ŝi estis 'foriginta'...”*.

Johano klopodas amikiĝi kun siaj enkarceraj kamaradoj, homoj kies ĝisnuna 'kastelo' foje estis ne pli ol viadukto, trinkejo aŭ bordelo. Li parolas pri ilia vivhistorio, pri bono kaj malbono en la mondo, pri konsciencaj konfliktoj, pri sociaj kaj politikaj sistemoj, pri zorgoj, revoj kaj sortobatoj, pri multe da plej diversaj temoj aktualaj, ankaŭ ĉiutagaj. Ĉu li povas fariĝi frato por tiuj, kiujn li hazarde renkontas sub la prizona tegmento? Li rakontas: *“Post preskaŭ 25-jara periodo, kiun mi grandparte pasigis en malliberejoj (ĉirkaŭ 150), mi ankoraŭ neniam renkontis prizonulon kiu estas la personiĝo de pura malico. En ĉiu el ili troviĝas ankaŭ io bona. Temas pri tio – flanke de konkretaj faktoj malbonaj kaj punindaj – vidi kaj vortigi ankaŭ ĉion bonan kaj pozitivan. Nur se ni konfirmas homojn en la 'malgraŭ ĉio' ĉeestanta bono, ili leviĝas kaj plihomiĝas, ili kaj ni. Tiu konvinko kaj tiu sperto rezultigas tion, ke la akcento iom post iom ŝoviĝas de 'puno' al 'zorgo', kaj finfine al eblecoj por (re)edukado kaj akompanado”*.

Liaj spertoj instruis al li, ke tre gravas scie kaj socie, metie kaj profesie ekipi prizonulojn por postpuna nova, sukcesa ŝanco ekster la senkompataj muroj. Lia devizo: traktu homojn kiel homojn. Prefere malpliigu 'universitatojn de kriminaleco' kaj konstruu pli da lernejoj.

Kion Johano opinias pri la fenomeno enkarcerigo?

*“Eble ĝi havas sencon kiel portempa antaŭrimedo, kiel ŝanco por pripensado kaj 'solvo' por sekurigi la socion. Sed nur kondiĉe ke la enkarcerigo ade paralelu kun ĉia profesia akompanado kiun la socio povas oferi: psikologia, jura, sociala, eduka, ktp. Longtempa aŭ dumviva restado en ŝtata punejo ankoraŭ nenie kaj neniam evidente pruvis sian plusvaloron. Zorgado estas esprimiĝo de amo. Kaj neniu birdo povas ami alian birdon, kiu ĝin malliberigintis!”*

# Germana Evangelia Foiro, Dresdeno

Raportas Wolfram ROHLOFF, DE

Ĉijare inter la unua kaj kvina de junio okazis en Dresdeno (Germanio) la 33a Germana Evangelia Foiro. Pli ol 120000 tuttempaj kaj potage kelkaj dekmil unutagaj partoprenantoj kunvenis je la oficiala temo "*... tie estos ankaŭ via koro*". (Mat 6, 21).

Ĉijare entute tri organizaĵoj prezentis Esperanton kaj ĝian utilon por eklezio kaj mondo en la tiel nomata *Foiro de Eblecoj*: la Germana Esperanto-Junularo (GEJ), la partio *Unu Mondo* kaj la germana sekcio de KELI.

La informstandoj de GEJ kaj KELI estis unu apud la alia en la foira sekcio pri *Interreligia kaj interkultura komunikado*. Tiu najbareco ebligis bonan kunlaboron inter la sep aktivuloj de GEJ kaj Pavel Polnický el Poděbrady, Ĉeĥio, Albert Jäger el Pirno, Saksio kaj mi, Wolfram Rohloff el Zöblitz, Saksio, Tiuj tri reprezentis la germanan sekcion de KELI: Esperanto-Ligo por Kristanoj en Germanio r. a.

Gejunuloj




La aktivuloj de GEJ ĉiutage plurfoje ofertis bone vizitatan lingvokurseton sur apuda herbejo kaj multflanke videbligis la eblecojn de Esperanto por gejunuloj.

En nia stando videblis diversaj libroj kaj informiloj en aŭ pri Esperanto. Speciale la Nova Testamento de la jaro 1912 impresis multajn, ĉar ili apenaŭ povis kredi, ke jam tiom longe ekzistas nia lingvo.

Por aliaj ni ofte laŭtlegis (kaj ankaŭ disdonis) la preĝon *Patro nia* aŭ la Apostolan kredkonfeson en Esperanto. Por ni ĉiuj estis agrabla laboro.

Mi volas danki ĉiloke al Karl Breuninger, kiu sendis al ni belajn grandformatajn fotojn (inter alie de *Bona Espero* kaj la fondaĵo ondo), al Karl Heinz Schäffer, kiu disponis al ni stokon de la libro *Mia amata Esperanto* (kiun ni malmultekoste povis pludoni), al Norbert Karbe el Pirno kaj speciale al la granda helpo de Pavel kaj Albert.

Dio vin benu!

P.S. Post sugesto de Pavel mi intencas nome de la germana sekcio de KELI venontjare inviti la KELI-kongreson al Zöblitz. Pli da informoj sekvos dum la ĉijara kongreso en Poděbrady.

Fotis: Albert Jäger kaj Ulrich Matthias



Wolfram Rohloff kaj Pavel Polnický en la informstando

Pavel Polnický kaj vizitanto




Albert Jäger (maldekstre) kaj
Pavel Polnický (dekstre)
informas sin mem pri Esperanto





Esperanto-kurseto de GEJ sur apuda herbejo

# Kelkaj ideoj de Søren Kierkegaard

## Rilato al la spirita dimensio

3:a kaj lasta parto de prelego dum la KELI-kongreso 2010
(bazita sur la sveda ”popularigita” libro pri Søren Kierkegaard)

Bengt Olof ÅRADSSON, SE

En la antaŭaj du numeroj aperis la komenco de la prelego. La artikolserio temas pri teorio de Kierkegaard, kaj mi volas emfazi ke estas nur teorio. Sed mi trovas ĝin ege pensiga kaj estas eroj en ĝi, kiujn mi trovas valoraj. Kierkegaard mem opiniis ke ĉiu devas trovi sian vojon, li nur raportas sian komprenon pri sia vojo al vivcelo kaj vivtasko. Lia vojo enhavas tri ŝtupojn aŭ rilatajn dimensiojn kaj ĉiu rilato havas tri paŝojn. La unua rilata dimensio temas pri nia rilato al la ekstera kaj fizika mondo. La dua temas pri mia rilato kun mia interno, la rilato kun mi mem. Ĉi-foje la parto temas pri mia rilato al la spririta mondo.

Mi tiel komprenas Kierkegaard ke ni devas havi bonan kaj sanan rilaton al ĉiuj dimensioj. Mi vere rajtas ĝui la fizikan mondon. Nur kiam la rilato al la fizika mondo troiĝas, ĝi trompas min. Eblas ke mi en tiu situacio miskomprenas ĝian gravecon kaj kredas ke tiu rilato estas mia vivintenco.

Por mi la plej grava punkto en la dua rilato, la rilato al mi mem, estas ke mi devas ekkompreni min, kaj esti honesta. Esti honesta kaj al mi mem kaj rilate al aliaj. Tiam mi estas aŭtenta homo. Ne ĉiam facile en nia societoj kiuj postulas ke ni sekvu normojn, havu rolojn kaj porti maskojn.

La tria rilato, la rilato al la spirita mondo, nun sekvas. Ĝi estas eĉ pli abstrakta sed espereble vi kaptas la ideon. Kierkegaard priskribas ĝin kiel la granda senlima amo. Por mi plej grave estas ke tiu amo povas montri sin en multaj formoj kaj ne nur troviĝas tie, kie mi laŭ tradicio supozas, ekzemple ne nur inter la limigaj muroj de mia propra eklezio. Ĝi vere *estas* – ĉie!

Ĉu Kierkegaard estis kredanto, kristano, oni povas demandi? Eble ne tute laŭ nia stilo, sed je la fino li esprimis *”Ho, gloro al Dio, mi nun komprenas min mem”*. Do laŭ mi li havis sian kredon, li kredis al Dio.

### Malfermi sin al la nekonata

De ĉiu tempo, de ĉiu lando, de ĉiu religio kaj ĉiu tipo da homoj ni scias ke ekzistas spiritaj spertoj. Ne nur aktivaj serĉantoj travivis tiujn spertojn. Ankaŭ tiuj kiuj ne havis ian penson pri la spirita dimensio.

Tiuj travivaĵoj similas unu la alian el multaj vidpunktoj: interna fenestro sin malfermas, ia sento aperas kaj prezentas iun novan perspektivon. Post la unua timo aŭ ĝojo oni trankviliĝas kaj sentas iun tipon de aparteneco. Troviĝas io kelkfoje interne, kelkfoje ekstere al kio

la egoo povas sin apogi. Kelkaj spertantoj parolas pri la sento de esti portata aŭ ĉirkaŭata. Sed de kie venas tiu travivaĵo?

Se oni volas serĉi tiun nekonatan dimension, oni ne devas kunporti antaŭajn prijuĝojn, antaŭajn kredojn, antaŭajn komprenojn. La filozofo Pseŭdo Dionysios skribis same dum la 6a jarcento al siaj disĉiploj ke oni devas lasi ĉion, kion oni antaŭe vidis kaj komprenis, ĉion, kion via menso komprenis ... Kiam vi lasis ĉion, kio estis vi malantaŭe, tiam vi estas preta leviĝi en la radio de Dia lumo kio estas for de ĉio.

Malfermi sin por la mistiko de la ekzistado, tio estas la defio de la 7a paŝo laŭ Kierkegaard. Malfermi sin, malplenigi sin, esti akceptema – tion Kierkegaard nomas konscia-tralumeco.

En diversaj tradicioj troviĝas meditaj teknikoj por tiel senŝeligi sin, siajn pensojn, siajn sentojn kaj nur esti, nur observi, ne prijuĝi.

Ankaŭ laŭ Søren ni devas praktiki. Ĉiam resti en la stadio de interna rilato,


Kierkegaard, 1840

ĉiam malferma por renkonti la nemondan en la mondo. La ĉiama praktikado per kiu ajn metodo formas nin, koncentrigas nin, kunigas nin. Sentoj ja venas kaj iras, la fantazio spekulativas pri tio, kio okazis kaj okazos, kaj la cerbo interpretas, sopiras kaj maltrankviliĝas. Sed la spirite trejnita homo sidas ĉe la arbo kaj spiradas trankvile.

Kiam la interna egoo estas en harmonio kun la spirito, malaperas la egoismo laŭ Kierkegaard. Ne plu estas bezono fiksiĝi ĉe la mondo aŭ sin mem. Mi iĝas senlima kaj mi trovas mian celon, mian vivintencon. Laŭ Søren tio estas per la Amo.

## Ami senkondiĉe

*"Se estas vero ... ke oni ne kredu tion kion oni ne per siaj okuloj vidas, oni tuj finu kredi je la amo."*

La amo ne nur estas nevidebla, ĝi estas tute mallogika. Per sia ekzistado ĝi pruvas ke la eterno ekzistas. Søren parolas pri la senkondiĉa amo, kiu nenion reciproke postulas. Ami sen ion ricevi.

Nia kutima ĉiutaga amo baziĝas en ni mem. Tiu amo temas pri mi kaj mia vivo, miaj aĵoj. Ĝi naskiĝas kune kun mi kaj mortas kune kun mi. Tiu amo estas *amo 'lite'*. El la eterna vidpunkto ĝi estas limigita, ĉar ĝi fokusiĝas nur je parto de la tuto. Se mi povas malfermi min al tio, kio estas pli granda ol mi, al tio, kio estas antaŭ mi kaj estos post mi, tiam ankaŭ mia amo transformiĝas al amo kun eterna perspektivo. Laŭ Kierkegaard tiu amo estas granda fluado

kaj mi estas parto de ĝi kaj pro tio ĉio estas aminda.

La amo estas la ligilo, la procezo, la vojo al la vivcelo. Travivante la amon ni povas ekhavi komprenemon. La amo estas la profunda profundeco kaj nia animo estas parto de la tuta unueco. Ĉio estas unuigita en tiu unueco. La aŭtenta homo komprenas tion per la senkondiĉa amo.

Iam persono demandis monaĥon de kie ni venas kaj kien ni iras en nia vivo. La monaĥo reen demandis: *Ĉu vi amas viajn najbarojn?* La demandito surpriziĝis kaj nur ĝenerale iom murmuris. La monaĥo do daŭrigis – *Anstataŭ pensadi pri la naskiĝo kaj la morto vi komencu per ami viajn najbarojn. La alia poste solviĝos*.

Kierkegaard same opiniis ke ni amu niajn najbarojn, ni same amu aliajn homojn. Ni amu ilin nur ĉar ili ekzistas – ankaŭ ili estas parto de la unueco.

Por ke mi tiel evoluu mi baze devas kompreni kiu mi estas – ke mi estas tiu kiu mi estas kaj interne mi havas nevundeblan punkton, ĉar mi valoras. Mi ne devas defendi min, mi ne devas rivali, mi ne devas antaŭjuĝi – kontraŭe mi povas respekti aliajn, aŭskulti ilin, rigardi ilin kun varmo. Ni baze havas nian internan sekurecon. Se ni povas formeti nian defendemon kaj niajn antaŭjuĝojn kaj nur observi malferme, la interna amo kreskos. La amo ĉiam estas tie, sed ni mem kovras ĝin per niaj agadoj rilate la ĉirkaŭaĵon, per niaj emoj defendiĝi, havi distancon, trovi pozicion rilate aliajn.

Post multe da serĉado, maltrankviliĝo kaj angoro Søren Kierkegaard rezignas sian propran evoluon. Kion li aŭdas de sia interna voĉo? Finfine li konkludas ke li estas la malfeliĉa amanto de siaj teorioj, ilia poeto, ilia pensanto – sed ŝajne ne ilia sekvanto. En aprilo 1849 li skribas en sia taglibro: *”Mi turniĝas, mi restos fidela je mia origino, ke mi baze estas poeto”* kaj li ankaŭ skribas *”Ho, gloro al Dio, mi nun komprenas min mem”*.

Sed Søren formulis ankoraŭ unu paŝon al tiuj kies voĉo instigas ilin daŭrigi sian vojon.

## Unuiĝo kun la tuto

La lastan paŝon laŭ la teorio de Kierkegaard ne multaj homoj atingas. Sankta Francisko el Asizo estas unu el tiuj. Tio vere signifas ke oni rezignas pri ĉio, malvestas sin kaj sekvas sian vivtaskon. Hildegard de Bingen estas alia, ankaŭ Sankta Birgitta kaj Sokrates kaj ni verŝajne povas aldoni Mahatma Gandhi kiu vivis post Kierkegaard. Ili *estas* pasio, ili *estas* amo. Ilin trafluas la granda eterna amo kaj tio estas ilia vivtasko.

La vortojn de Paŭlo mi nun pli bone komprenas. Li skribas al la Galatoj (2:20-21) ”*tamen mi vivas; jam ne mi mem, sed Kristo vivas en mi; kaj tiun vivon, kiun mi vivas en karno, mi vivas en fido al la Filo de Dio, kiu min amis kaj sin donis pro mi. Mi ne vanigas la gracon de Dio; ĉar se per la leĝo venas justeco, Kristo ja vane mortis.*”

# Sekretaria jarraporto 2010 –2011

Raportas Pavel Polnický, CZ

Karaj kelianoj, post iom pli ol unu monato ni jam kongresos en Poděbrady kaj mia sekretaria devo estas prezenti al Vi ĉiuj jarraporton pri la aktivado de nia ligo. Jam komence mi devas konstati, ke ni troviĝas en ne tro facila situacio.

Pasintjara jarkunveno decidis nuligi enskribon de KELI ĉe Ĉambro de Komerco en Nederlando kaj daŭrigi nian ekzistadon en Francio. Ankaŭ ni planis ŝanĝon de nia Statuto. Kun tio estas multe da diversaj traktadoj, diskutoj kiuj plej ofte okazas pere de retmesaĝoj kaj telefonado...sed en la momento kiam mi skribas tiujn liniojn ne ĉio estas farita, ĉar ne ĉiuj estraranoj partoprenas aktive. Do, ni devas esperi, ke la nova 100-jara periodo de KELI komencos sukcese.

Mi daŭre estas je Via dispono kaj mi respondas ricevitajn mesaĝojn kaj leterojn. Same mi volonte sendus al Vi libreton Preĝo por ĉiu tago, kiu estas en sufiĉe granda kvanto. Ne forgesu mendi ĝin kaj subteni tiamaniere laboron de Evidente. Nun tre malofte mi bedaŭrinde ricevas informojn pri agado de niaj sekcioj kaj grupetoj en diversaj landoj.... jen kelkaj:

**Finnlandaj** kaj **estoniaj** gefratoj renkontiĝis okaze de *Aŭtunaj tagoj* kaj en ĝia kadro okazis jarkunveno de finnlanda sekcio kun la elekto de nova estraro kiu akceptis agadplanon kaj buĝeton. Sekcio havas 17 membrojn.

**Germana** sekcio preparis standon por Kirchentag en Dresdeno (pri ĝi Vi legu apartan raporton).

La **sveda** sekcio okazigis sian jarkunvenon en la kadro de la Sveda Esperanto-kongreso. Kiel komenca programero dimanĉe matene, la sekcio aranĝis diservon. Ĝin gvidis Leif Nordenstorm. Mats Landfors estis reelektita prezidanto.

Mi esperas, ke ni dum la jarkunveno de KELI aŭdos pli detale pri aliaj landaj sekcioj kaj grupoj, kiuj aktivas, sed nenion informas… ☙



Estraranoj dum la jarkunveno 2010 en Beregdaróc. Fotis: Wil van Ganswijk

# Propono pri statutŝanĝo

| **Antaŭa teksto** | **Propono de modifo** |
|---|---|
| *1. Nomo*:<br>La nomo de la Ligo estas: KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA, (K.E.L.I.). Ĝi estas fondita la 25-40 de aŭgusto 1911 kaj havas sian sidejon ĉe sekretario | *1. Nomo*:<br>La nomo de la Ligo estas: KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA, (KELI). Ĝi estas fondita la 25-a de aŭgusto 1911 **kaj ĝian sidejon fiksas la Jarkunveno. Ekde la 7a de aŭgusto 2010 ĝi troviĝas en Nouaillé Maupertuis, Vienne, Francio, ĉe Philippe Cousson, 26 rue de Pré Ventenet.** |
| *2. Bazo:*<br>La Ligo akceptas kiel bazon:<br>a) ke la Sankta Biblio, kiel la Vorto de Dio, havas absolutan kaj plensufiĉan aŭtoritaton por doktrino kaj vivo.<br>b) ke Jesuo Kristo estas la solenaskita Filo de Dio kaj la sola Savanto de la mondo. | *2. Bazo:*<br>**KELI estas Ligo de membroj kiuj konfesas la Sinjoron Jesuo Kristo kiel Dion kaj Savanton laŭ la Skriboj kaj strebas kune plenumi sian komunan vokiĝon por la gloro de la sola Dio, Patro, Filo kaj Sankta Spirito.** |

**Komentoj al la propono pri statut-ŝanĝo**

**Artikolo 1.** La ŝanĝo estas necesa pro la re-registriĝo en Francio. Adreso ĉe sekretario signifas Ĉeĥion, kaj ne permesas registriĝon en Francio. La proponata teksto jam estis anticipe sendita al la Franca instanco por registriĝo de nova adreso. La Statuto devas mencii precizan lokon ("fiksita de la jarkunveno" ne sufiĉas). Tio signifas ke oni devos modifi tiun ĉi artikolon ĉiam, kiam oni translokigos la sidejon.

**Artikolo 2**. La antaŭa teksto apartenas al la historio de nia Ligo, respegulas tiamajn diskutojn, sed aspektas tro fermita al pluraj inter ni kvankam ĝi ne kaŭzas problemon al aliaj. La formulo proponata venas el la Ekumena Konsilantaro de Eklezioj. Ĝi tamen povas ankoraŭ kaŭzi problemon por unitarianoj. Ni tamen devas formuli nian "kristanan" karakteron kaj la fonto EKE taŭgas. Estas ebleco anstataŭi "la Skriboj" kiel ĉe EKE per "la (Sankta) Biblio" kiel en nia antaŭa teksto. La vorto "sola" ne ekzistas en la germana versio de la teksto de EKE.

## Plej gravaj punktoj el kongresa programo

| | | | |
|---|---|---|---|
| mardo | 2. 8 | | alveturo kaj loĝigo |
| merkredo | 3. 8 | 9.30 | festa malfermo de la kongreso en la urbodomo |
| | | 10.30 | diservo – predikos P. Cousson |
| | | 14.30 | trarigardo de la urbo |
| | | 16.30 | malfermo de la ekspozicio pri esperanto |
| ĵaŭdo | 4. 8. | 9.00 | tuttaga ekskurso al Kutná Hora |
| sabato | 6. 8. | 9.00 | jarkunveno de KELI |
| dimanĉo | 7. 8. | 9.45 | dulingva diservo kun SV predikos Pavel Klimeš |
| | | 14.00 | duontaga ekskurso al Přerov nad Labem |
| | | 19.30 | koncerto – operaj kaj operetaj arioj |

## Tagordo por la jarkunveno de KELI 2011

1 Malfermo
2 Elekto de kunprotokolantoj
3 Akcepto de la tagordo
4 Komunikoj
5 Funebra memorigo
6 Sekretaria jarraporto
7 Kasista jarraporto
8 Raporto de la kaskontrolantoj
9 Diskuto kaj akcepto de la raportoj
10 Buĝetoj
11 Raporto de la redaktoro
12 Estrarelekto
13 Propono kaj akcepto de nova statuto
14 Kongresplanoj
15 Proponoj kaj sugestoj de la membroj
16 Fermo

**Klarigoj:**

*(12) Ĉi-jare finiĝas la 3-jara deĵorperiodo de Siegfried Krüger, Pavel Polnický kaj Ágnes Ráczkevy-Eötvös,*

*(14) Pasintjare akceptita ekumena kongreso en Hunario neokazos kaj alia propono ĝis nun ne venis*

## Financa raporto de KELI 2010 (Ĉiuj sumoj en EUR)

| | | Bilancoj fine de la jaroj 2009 | 2010 |
|---|---|---|---|
| **Aktivoj** | ING banko, NL, ĝiro 0% | 1.756,06 | 2.953,70 |
| | ING banko, NL, konto (1,5%) | 34.168,18 | 34.728,08 |
| | UEA-konto kelk-p | 1.458,50 | 2.786,46 |
| | Kasista kaso | 0,00 | 7,20 |
| | Pavel Polnický, CZ | 410,00 | 527,00 |
| | *Monrimedoj* | *37.792,74* | *41.002,44* |
| | Postulo el librovendado (Biblio) | 122,20 | 0,00 |
| | *Postuloj* | *122,20* | *0,00* |
| | Stokoj (libroj) | 5.604,10 | 5.604,10 |
| | E-Misio, Kasedoj D.K. | 116,00 | 116,00 |
| | *Provizo* | *5.720,10* | *5.720,10* |
| | Transitaĵoj | 0,00 | 0,00 |
| | **Aktivoj sume** | **43.635,04** | **46.722,54** |
| **Pasivoj** | Kapitalo | 9.172,34 | 9.893,67 |
| | Saldoj negativa/pozitiva | **721,33** | **1.271,40** |
| | *Kapitalo entute* | *9.893,67* | *11.165,07* |
| | Dumvivaj membroj | 2.327,64 | 2.327,64 |
| | E-Misio | 6.794,51 | 6.894,51 |
| | Helpa kaso | 2.523,15 | 2.975,15 |
| | Junulara helpa kaso | 337,45 | 337,45 |
| | Kongresa rezerva kaso | 1.449,48 | 1.813,48 |
| | Literatura/Himnara kaso | 13,058,57 | 12.959,57 |
| | Informada/Varbada kaso | 149,72 | 649,72 |
| | Legaco C.P.W. | 2.268,90 | 2.268,90 |
| | Legaco E.t.O.-W. | 2.268,90 | 2.268,90 |
| | Legaco Boven | 1.865,00 | 1.865,00 |
| | *Fondusoj entute* | *33.043,32* | *34.360,32* |
| | Pasivoj | 410,80 | 374,00 |
| | Kreditoroj | 95,25 | 95,25 |
| | Transitaĵoj | 192,00 | 727,90 |
| | *Pasivoj* | *698,05* | *1197,15* |
| | **Pasivoj sume** | **43.635,04** | **46.722,54** |

## Klarigoj kaj rimarkoj pri la bilanco 2010-12-31

**Aktivoj**

Pavel Polnicky: Li gvidas kason por pagi la presadon kaj sendadon de DR el CZ

Stokoj: Biblio 2003 (44), Biblio 2006 (617), Novaj Testamentoj broŝ. (30), Novaj Testamentoj bind. (36), Evangelioj laŭ Johano (33), Adoru Kantante (9), Esperante kaj Ekumene (2), Adoru (15). La libroj estas parte stokataj ĉe Els van Dijk(NL) kaj Jacques Tuinder(NL), Pavel Polnický(CZ), Bengt Olof Åradsson(SE),Siegfried Krüger(DE), Eva Farkas(HU), Karl Heinz Schaeffer(DE). La plej grandan parton de la Biblioj (2006) stokas por ni Bernhard Eichkorn (DE). Bilanco kaj kontigo de la 2010 venditaj Biblioj escepte nur en 2011!

E-Misio kasedoj: Dimanĉa koncerto (40) La vendontoj estas petataj kontakti la kasiston.

**Pasivoj**

Kapitalo: Estas la libera kapitalo, alian vidu sub Fondusoj

Saldo pozitiva: 1271,40 EUR

Fondusoj: Helpa kaso: Estas por helpo al nepagipovaj membroj partopreni kongreson.
Ni subtenis kelkajn personojn.
E-Misio: la kaso estas restaĵo el iama sveda agado. Vera misio ne okazis, estas nur monelspezoj misicele. KELI-membroj donacis pere de la kasisto 2010 al Evidente 452 EUR

Kreditoroj: Brita kaso 95,25 EUR (Jean Bisset)

Pasivoj: Evidente: 314 EUR, sekretariaj kostoj 2010: 60 EUR

Transitaĵoj: Antaŭricevitaj kongreskotizoj 2011: 355,40 EUR

## Rezulto 2010 kaj buĝetoj 2011 kaj 2012 (Ĉiuj sumoj en EUR)

| | Buĝeto 2010 | Rezulto 2010 | Buĝeto 2011 | Buĝeto 2012 |
|---|---|---|---|---|
| **Elspezoj** | | | | |
| Presisto kaj sendado de DR | 2.900 | 2.938,00 | 3.000 | 3.000 |
| Perantoj | 20 | 20,00 | 20 | 20 |
| *Revuokostoj* | *2.920* | *2.958,00* | *3.020* | *3.020* |
| Prezidanto | 30 | 0,00 | 30 | 30 |
| Sekretario | 60 | 70,00 | 70 | 70 |
| Redaktoro | 250 | 250,00 | 300 | 250 |
| Kasisto/Matrikulisto | 30 | 158,28 | 40 | 40 |
| *Estrarkostoj* | *370* | *478,28* | *440* | *390* |
| UEA-kotizo | 60 | 60,00 | 60 | 60 |
| Ĉambro de Komerco | 40 | 26,14 | 27 | 27 |
| Kaskontrolo | 75 | 29.20 | 50 | 50 |
| Bankkostoj | 35 | 41.56 | 40 | 45 |
| Merituloj | 30 | 30,00 | 60 | 30 |
| UK Lukostoj | 40 | -40,00 | 80 | 80 |
| *Ĝeneralaj kostoj* | *280* | *146,90* | *317* | *292* |
| Librovendado (kostoj) | 125 | 0,00 | 150 | 125 |
| Varbado (Inf./varba kaso) | 20 | 0,00 | 20 | 20 |
| Rabatoj de Perantoj | 15 | 14,60 | 15 | 15 |
| *Aliaj elspezoj* | *160* | *14,60* | *185* | *160* |
| **Elspezoj entute** | **3.730** | **3.597,78** | **3.962** | **3.862** |
| **Enspezoj** | | | | |
| Kotizoj/Abonoj | 2.600 | 3.444,25 | 2.500 | 2.500 |
| Kotiz- kaj kursdiferencoj | 10 | 0,00 | 10 | 10 |
| Adopta Kaso | 500 | 665,03 | 600 | 600 |
| *Kotizoj entute* | *3.110* | *4.109,28* | *3.110* | *3.110* |
| Librovendado | 215 | 0,00 | 300 | 250 |
| Rentumoj | 800 | 559,90 | 600 | 700 |
| Profito el kongreso | 300 | 200,00 | 500 | 0 |
| *Aliaj enspezoj* | *1.315* | *759,90* | *1.400* | *950* |
| **Enspezoj entute** | **4.425** | **4.869,18** | **4.510** | **4.060** |
| **Saldoj** | **390** | **1.271,40** | **548** | **198** |

## Klarigoj pri la rezulto 2010 kaj la buĝetoj 2011/2012

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Kotizoj pagendaj de | | | | |
| Membroj individuaj | 131 | (126) | Nuraj abonantoj ... | 16 (22) |
| Membroj familianaj | 2 | (7) | IKUE-abonantoj ... | 20 (25) |
| Membroj subtenantaj | 1 | (5) | | 36 (47) |
| Membroj dumvivaj | 19 | (19) | | |
| Membroj adoptitaj | 93 | (125) | | |
| | 246 | (282) | (antaŭa jaro inter krampoj) | |

La membraro reduktiĝis. Pasintece nepago ne tuj signifis eksiĝon, pro tio en 2010 nun pli konsekvenca ago.

**Librovendado:** La kostoj aŭ enspezoj pro librovendado influas la saldon.

**Adopta Kaso:** Mono donacita de la KELI-membraro por membroj, kiuj ne povas pagi la kotizojn aŭ nur parte. Estas membroj en Albanio, Afriko, Bulgario, Ĉinio, Estonio, Hungario, Litovio, Pollando, Rumanio, Rusio. Ili estas petataj kontribui "laŭforte" (kotizo laŭ interkonsento kun la landa peranto). Koregan dankon al ĉiuj donacintoj kaj donacontoj. *En 2010 enfluis 665,03 EUR*
**Kotizoj** hungaraj 90 EUR
**Donacoj de KELI-sekcioj:** finna 120, brita 59, nederlanda 250. Unuopaj membroj entute 146,03 EUR (Flach, NL; Ahlrén, SE; Sandoz, CH: Laszlo, RO; Sabolciu, RO; Südland, DE)

En Hungario, Rumanio kaj Ĉeĥa Respubliko intertempe kreskas la nombro de plene pagantaj membroj.

Saldoj 2010, 2011 kaj 2012: La financa bazo de KELI estas ankoraŭ kontentiga.

Heilbronn, 2011-04-15

**Siegfried KRÜGER**,
kasisto




De maldekstre al dekstre:
Norbert Südland
Karl Heinz Schaeffer
Siegfried Krüger

# Informetoj

## Interreta parolo inter Jacques Tuinder kaj Siegfried Krüger pri mondonacoj al Evidente.

----- Original Message -----

**Subject:** Mondonaco por Evidente

Kara Jaques, mi havas en la librotenado de KELI por Evidente ankoraŭ 314 EUR. 150 EUR venas el la kongresa gajno 2010, 90 EUR de la sveda sekcio, 44 EUR venditaj preĝlibretoj, 30 EUR el diversaj fontoj.

Mi volas ĝiri per UEA. Ĉu al via UEA-konto aŭ al la ING-Bank konto?

Esperas je via bonfarto kaj salutas vin ambaŭ tre kore

Siegfried

Kara frato,

Miras kaj ghojas pri tiu alta monsumo. En marto ni starigos optikejon en Mauritanio kaj en aprilo en Okcidenta Ukrainio (Lvov). Tiu helpo – prefere al ING-Banko – estas do tre bonvena. Ĉu mi sendu dankleteron al iu adreso? Bonfartas ni ambaŭ. Plej kore vin kaj Erika salutas Valentine,

Vera/Jacques

Kara Jacques,

mi ĝiros al ING-Banko. Dankletero eble al Bengt Olof pro la donaco de la sveda sekcio. La pasinta kongreso havis gajnon! El tiu gajno mi decidis tiujn 150 EUR. Do danko al Agnes. Pri pliaj donacoj ni komune decidu.

Tre kore salutas vin ambaŭ

Siegfried

Plej karaj,
Tutkorte mi dankas vin pro la bonaj mondonacoj por 'Evidente' flanke de KELI kaj svedaj gefratoj. Mi havas dorlot- tagon, ĉar ĝuste hodiaŭ mi ricevis leteron de granda porblindula organizaĵo en Nederlando ke ĝi subvencios nian novan projekton (marto 2011) en Mauritanio (optikejo) per 8000 eŭroj. Dankon al la ĉielo.

Plej kore, Jacques

# Boĵidar Leonov – 70 jara

prezidanto de TOLE (Tutmonda ortodoksa ligo esperantista) ĝisvivis la 16-an de junio tiun gravan vivjubileon. Multajn pliajn jarojn plenaj de sano, energio kaj aktivadoj kun la beno de Dio deziras KELI-anoj.



## Religioj el la tuta mondo atendataj en Bruselo

Pli ol 10 000 partoprenantoj, 500 programeroj

En 2014 pli ol 10 000 partoprenantoj de malsamaj religioj kaj malsamaj tradicioj estos dum tuta semajno en Bruselo kun pli ol 500 programoj, atelieroj kaj renkontiĝoj. Diversaj religiaj komunumoj kaj kulturaj instancoj ofertos muzikon, dancon, art-ekspoziciojn kaj aliajn eventojn.

Eble iuj esperanto-parolantoj povos partopreni pere de iliaj religiaj asocioj kaj samtempe funkcii kiel montrofenestron por Esperanto, lingvo de paco kaj amo?

Legu pli sur: www.brussels2014.eu (angle)
Interesatoj rekontaktu min por ke mi informu la asocion de Esperanto en Bruselo.

Sincere via,
Herman Deceuninck

# La tero granda tablo estas

La tero granda tablo estas
ĉe kiu multaj sidas.
Se manĝon ni dividas,
malsato ne plu restas.

La tero granda fonto estas.
Se ni ĝin ne detruas,
la akvo ĉiam fluas,
soifo ne plu restas.

La tero laborejo estas.
Se agas kun sindono
ni por tutmonda bono,
mizero ne plu restas.

La tero granda templo estas.
Malsamas la adoro.
Kun tolerema koro
malpaco ne plu restas.

Inspirita de la germana poemo
*Die Erde ist ein großer Tisch*



Ulrich Matthias
Ulrich.Matthias@t-online.de